

# Apokrifa Evangelio Greka laŭ Tomaso

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling

## *Interrete:*

### *Klarigo en Vikipedio:*

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Evangelio\\_de\\_la\\_infanaĝo\\_laŭ\\_Tomaso](https://eo.wikipedia.org/wiki/Evangelio_de_la_infanaĝo_laŭ_Tomaso)

### *La Greka versio laŭ Tischendorf:*

ne trovita

### *Germana traduko:*

<http://sadlove.de/2011/04/21/das-kindheitsevangelium-jesu-nach-thomas/>

### *Diversaj Anglaj versioj:*

<http://www.earlychristianwritings.com/infancythomas.html>

*Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-10.*

## *Apokrifa Evangelio Greka laŭ Tomaso*

**1** 1 Mi, Tomaso Izraelido, opinias necesa diskonigi al ĉiuj fratoj el la gojoj pri la infanaĝo kaj pri la grandaj faroj de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiujn li faris de post sia naskiĝo en nia lando. Ties komenciĝo estis jena:

**2** 1 Tiu ĉi infano Jesuo, kiam li estis kvinjara, foje estis ludanta en fluejo de rivereto, post pluvado, kaj la fluantan akvon li kolektis en putetojn kaj tie li tuj faris ĝin klarega, kaj li regis ĝin per sia nura parolo. 2 Kaj farinte el ĝi molanargil-amason, li muldis dek du paserojn. Estis sabato, kiam tion li faris. Kaj multaj aliaj infanoj kunludis kun li. 3 Kiam iu Judo vidis, kion ludas Jesuo sabate, li forrapidis por rakonti tion al lia patro Jozefo: Jen via infano estas ĉela rivereto, kaj el argilo li faris dek du paserojn<sup>1</sup>, kaj tiamaniere li profanis la sabaton. 4 Jozefo iris tien kaj kiam li ekvidis lin, li vokis al li. Kial vi faras sabate, kion fari vi ne rajtas? Jesuo kunfrapis la manojn, kaj vokis al la paseroj: For!, kaj la paseroj flugis for, pepante. 5 Kiam la Judoj tion vidis, ili miris, kaj forirante ili rakontis al siaj gvidantoj, kion faris Jesuo antaŭ iliaj okuloj.

**3** 1 La filo de Anas la skribisto staris tie ĉe Jesuo. Li prenis salikbranĉeton kaj per ĝi elfluigis la akvon, kiun kolektis Jesuo. 2 Kiam

---

<sup>1</sup> Vidu ankaŭ en Korano 5:111

Jesuo tion vidis okazi, li ekkoleris kaj diris: Fi! Malpia kaj stulta! Kion malbonan kaŭzis al vi tiuj putetoj kaj tiu akvo? Jen nun vi sekiĝos, kvazaŭ arbo sen folioj, sen radiko aŭ fruktoj. 3 Kaj tuj la knabo komplete elsekiĝis. Jesuo foriris kaj atingis la domon de Jozefo. La gepatroj de la sekiĝinta knabo forportis lin, prilamentante lian junecon, kaj ili portis lin al Jozefo kaj riproĉis lin: Ke tian infanon vi havas, kiu tiajn aferojn faras!

**4** 1 Alian fojon li iris tra la vilaĝo. Knabeto alkuris kaj kunpuŝiĝis kun lia ŝultro. Incitite Jesuo diris al li: Vi ne daŭrigos la vojon! Tuj li falis, mortinta. Kelkaj kiuj tion vidis, diris: De kie devenas ĉi infano, ke ĉiu lia parolo tuj fariĝas fakto? 2 Kiam la gepatroj de la mortinta knabo venis al Jozefo, ili riproĉe diris al li: Vi ne plu povas loĝi en ĉi vilaĝo kun ni, ĉar tian infanon vi havas. Aŭ vi devos instrui al li beni kaj ne plu malbeni. Ĉar li mortigas niajn infanojn.

**5** 1 Kaj Jozefo flanken vokis la infanon al si, kaj admonis lin: Kial vi faras tiajn aferojn, ke la homoj per tio suferas, kaj ke ili malamas kaj persekutas nin? Jesuo respondis. Mi scias, ke tiuj viaj diroj ne estas la viaj; pro respekto al vi, mi do silentos. Sed la aliaj ricevos sian punon. Kaj tuj blindiĝis tiuj, kiuj malbondiris pri li. 2 Kiuj tion vidis, ektimis terure kaj ne sciis kion fari. Kaj ili diris pri li, ke kion ajn li diras, ĉu bone ĉu malbone, tuj fariĝas fakto kaj montriĝas miraklo. Konsciinte, ket ion faris Jesuo, Jesuo prenis lin je la orelo kaj forte ĝin pinĉis. 3 Sed la knabo koleriĝis kaj diris al li: Sufiĉas por vi nur serĉi kaj ne trovi. Vi ja agis treege nesaĝe! Ĉu vi ne scias, ke mi estas la via? Do ne kolorigu min.

**6** 1 Certa rabeno<sup>2</sup>, laŭnome Zakĥeo, staris en <apuda> ĉambro<sup>3</sup>, kaj kiam li aŭdis, ke tion Jesuo diris al la patro, li tre miris, ke, kiel nura infano li diras tiaĵojn. 2 Kelkajn tagojn poste li sin turnis al Jozefo kaj

---

<sup>2</sup> Laŭ la rakonta kunteksto devas temi pri rabeno, sed la Greka teksto (kiu plurloke ja montras nescion pri tipe Judaj aferoj) uzas la vorton καθηγγητής (t. e. nia vorto kateĥizisto), kiu signifas edukanto, instruisto aŭ simile. Poste Zakĥeo plurloke estas indikata kiel instruisto.

<sup>3</sup> Traduko ne tute certa.



diris al li: Vi havas inteligentan knabeton: li saĝas. Konfidu lin al mi, por ke li lernu la literojn, kaj mi instruos al li krom la literoj ĉiun scion, ankaŭ, kiel oni salutu ĉiujn pliaĝulojn, kaj kiel oni honoru ilin kvazaŭ antaŭulojn kaj patrojn, kaj kiel oni amu la samaĝulojn. 3 Kaj li klarigis al li tre sindone kaj klare ĉiujn literojn, ekde *Alfa* ĝis *Omega*<sup>4</sup>. Sed Jesuo tre fiksrigardis al rabeno Zakĥeo, kaj diris al li: Vi ne konas la *Alfa*-n laŭ ties naturo; kiel do la *Beta*-n vi instruu al aliaj? Hipokritulo! Unue klarigu la *Alfa*-n, se tion vi povas, kaj nur post tio ni kredos vin rilate la *Beta*-n. Kaj tiam li komencis pridemandadi la instruiston pri la unua litero, sed tiu ne kapablis respondi al li. 4 Dum multaj aŭskultis, li diris al rabeno Zakĥeo: Aŭskultu, instruisto, pri la konstruo de la unua baza litero, kaj rimarku, kiel ĝi posedas trabojn kaj mezan streketon, kiuj – kiel vidate – kune dis-kruras, kuniĝas, altiĝas, dancas <...>. Tri specojn de traboj havas la *Alfa*: homogenajn, hiparĥontajn kaj isometrajn<sup>5</sup>.

**7** 1 Kiam la instruisto Zakĥeo aŭdis, ke la knabo eldiras tiajn kaj tiel profundajn alegoriojn pri la unua litero, li ne plu sciis kion respondi al tio pro lia granda erudicio. Kaj li diris al la ĉestantoj: Ho ve! Kompatinda mi! Mi ne scias kion diri. Mi altiris ĉi honton al mi mem, kiam ĉi knabeton mi alproksimigis al mi. 2 Reprenu lin do, frato Jozefo, mi petas vin. Mi ne eltenas la forton de lia rigardo. Mi ne en unu fojo travidas, kion li diras. Tiu knabeto ne devenas el la tero: li eĉ mastras la fajron! Eble li estis naskita antaŭ la kreo de la kosmo. Kia ventro portis lin, kia utero kreskigis lin: mi ne scias! Ve! Karulo, mi perdas la saĝon: mi ne povas sekvi lian inteligenton. Mi trompiĝis, trioble kompatinda mi! Mi klopodis por ricevi lernanton, kaj montriĝis havi instruiston. 3 Mi bone

---

<sup>4</sup> Respektive la unua kaj la lasta litero de la Greka alfabeto – kvazaŭ la Judoj nur uzus tiun skribon. La *Beta* estas la dua litero. En *Apokalipso* 1:8 ni legas: Mi estas la alfa kaj la omega, diras la Sinjoro Dio, la Estanto kaj la Estis kaj la Ontonta, la Tutpotenculo. Jesuo do ĉi tie, ŝajne, riproĉas al la instruisto, ke tiu ne konas ĉi Kredkonfeson de frua Kristanismo!

<sup>5</sup> Supozeble difektita estas la teksto. Kelkaj fakuloj sugestas, ke krom aludoj al Gnostikaj sekretaj instruoj enestas – iom post iom miskomprenitaj ĉe kopiado – aludoj al la formo de la Hebrea litero *Alef*: א.

konscias, amikoj, pri mia honto: estante maljuna, mi estis venkita de knabeto. Mi senkuraĝiĝas, mi mortas pro ĉi knabo. Ĉar en ĉi memomto mi ne kapablas rigardi en lian vizaĝon. Kaj se ĉiuj diros, ke knabeto min venkis, kion mi povos diri? Kaj kiel mi klarigu, kion li rakontis pri la traboj de la baza unua litero? Mi ne scias, amikoj. Ĉar mi ne konas la devenon kaj la destinon de li.<sup>6</sup> 4 Tial, frato Jozefo, mi petas vin: reprenu lin en vian domon. Ĉar ĉi tiu estas granda, ĉu Dio aŭ anĝelo aŭ mi ne scias, kiel nomi lin.

**8** 1 Dum la Judoj konsiladis al Zakĥeo, la knabeto laŭte ridis kaj diris: Nun viaj aĵoj fruktigu, kaj la kore blindaj rigardu. Mi ĉeestas de supre, por ke mi malbenu ilin kaj voku ili al la alto, kiel estis ordonite de Tiu, kiu mon sendis pro vi. 2 Kiam la knabeto ĉesis paroli, tuj ĉiu sin sentis savitaj, kiuj falis sub lia malbeno. Kaj neniu plu kuraĝis ĝeni lin, por ne esti malbenata aŭ esti handikapita.<sup>7</sup>

**9** 1 Kelkajn tagojn poste Jesuo ludis en iu domo en la supra etaĝo, kaj unu el la knaboj, kiuj ludis kun li, falis malsupren kaj mortis. Kaj ĉiuj aliaj knabetoj fuĝis, kiam tion ili vidis; nur Jesuo restis. 2 Kiam la gepatroj de la mortinta knabo venis, ili vokis lin. <Sed Jesuo diris: Mi ne ĵetis lin malsupren.> Sed ili minacis lin. 3 Tiam Jesuo saltis suben el la supra etaĝo, surteriĝis apud la kapo<sup>8</sup> de la knabeto kaj laŭtege kriis al li: Zenono – ĉar tio estis lia nomo – mi diras al vi: Stariĝu! Kaj diru, ĉu mi ĵetis vin malsupren. Kaj leviĝinte tuj li diris: Ne, Sinjoro, vi ne ĵetis min malsupren, sed vi restarigis min. Kiuj tion vidis, estis perpleksaj. La gepatroj de la knabeto laŭdis Dion pro la signoj, kiuj okazis, kaj ili adorkliniĝis antaŭ Jesuo.

**10** 1 Kelkajn tagojn poste iu junulo en la najbaraĵo fendis lignon. Lia hakilo falis kaj fendis la bazon de la piedo. Li perdis tiom da sango, ke li

---

<sup>6</sup> Deveno kaj destino – vortludo kun origino kaj fino aŭ alfa kaj omego.

<sup>7</sup> Aŭ: blinda.

<sup>8</sup> Laŭlitere: Apud la buŝo.

mortis. 2 Fariĝis homamasiĝo kaj ega bruado, kaj ankaŭ la knabeto Jesuo tien iris. Perforte li faris al si vojon tra la amaso, kaj kaptis la vunditan piedon de la junulo, kaj tuj tiu saniĝis. Li diris al la junulo: Nun stariĝu, kaj plu fendu la lignon, kaj memoru min. Kaj la amaso, kiu tion vidis okazi, adorkliniĝis antaŭ la knabeto, dirante: Vere, la Spirito de Dio loĝas en ĉi knabeto.

**11** 1 Kiam li estis sesjara, lia patrino sendis lin ĉerpi akvon kaj porti hejmen. Ŝi donis al li por tio kruĉon. Sed li koliziis <kontraŭ iu> en la amaso, kaj la kruĉo rompiĝis. 2 Jesuo etendis la mantelon, kiun li surhavis, plenigis ĝin per akvo kaj tion portis al sia patrino. Kiam la patrino vidis la signon, kiu okazis, ŝi kisis lin, kaj ŝi konservis en si la misteron, kiun ŝi vidis lin plenumi.

**12** 1 Alian fojon, kiam estis tempo semi, la knabeto eliris kun sia patro por semi tritikon sur la propra tereno. Kaj dum semis la patro, ankaŭ la knabeto Jesuo semis unu kernon da tritiko. Ĉe la rikolto kaj la draŝado li kolektis 100 kor'ojn<sup>9</sup>. Li kunvokis ĉiujn malriĉulojn de la vilaĝo al la draŝejo, kaj donacis al ili la tritikon. Kaj Jozefo ricevis, kio restis el la tritiko. Kiam ĉi signon li faris, li aĝis 8 jarojn.

**13** 1 Lia patro estis ĉarpentisto, kaj en tiu tempo li faradis plugilojn kaj jugojn. Iu riĉulo foje mendis ĉe li liton<sup>10</sup>. Ĉar unu el la traboj estis malpli longa ol la alia, kaj Jozefo ne sciis, kion fari, la knabeto Jesuo diris al sia patro: Kuŝigu ambaŭ lignopecojn, kaj ekde la mezo egaligu ilin. 2 Jozefo agis laŭ la ordono de la knabeto: Jesuo ekstaris ĉe unu flanko kaj ekprenis la malpli longan lignaĵon; li ektiris ĝin kaj faris ĝin egala al la alia. Kaj lia patro Jozefo vidis tion kaj miris; li brakumis la knabeton, kisis lin kaj diris: Feliĉa mi estas, ĉar ĉi knabeton donis al mi Dio.

---

<sup>9</sup> 1 Kor ≈ 364 litroj.

<sup>10</sup> Por iom montri la stilon de l' originalo: tute laŭlitere la frazo jene legiĝas: Estis mendita al li lito, flanke de iu riĉulo, por ke li faru por li. Laŭ la Araba evangelio pri la Junaĝo de Jesuo, la koncerna riĉulo estis *la Reĝo de Jerusalemo*.



**14** 1 Ĉar Jozefo vidis la inteligenton kaj la aĝon de la knabeto, ke ili ekfloras, li denove pripensadis, ke li ne restu analfabeto; do li kunprenis lin kun si kaj konfidis lin al alia instruisto. La instruisto diris al Jozefo: Unue mi instruos al li la Grekan, kaj poste la Hebrean. La instruisto ja bone konsciis la kapablojn de la knabeto, kaj timis lin. Li do skribis la alfabeton kaj ekzercigis lin pri ĝi dum longa tempo, sed Jesuo ne respondis al li. 2 Fine Jesuo diris al li: Se vere vi estas instruisto, kaj se vere vi scias la literojn, diru do al mi, kio estas la forto de *Alfa*, kaj tiam mi respondos al vi pri la *Beta*. Iritiĝinte, la instruisto frapis al li je la kapo. Kiam la knabeto sentis la doloron, li malbenis lin, kaj tuj li svenis kaj falis vizaĝalteren. 3 La knabeto reiris al la domo de Jozefo. Kaj Jozefo tre maltrankviliĝis, kaj petis lian patrinon ne plu lasi Jesuon eksteren, ĉar ĉiuj, kiuj iel vekis lian koleron, mortis.

**15** 1 Iom poste, ree alia edukisto, intima amiko de Jozefo, diris al li: Konduku la knabeton al mia lernejo; eble mi povos instrui al li la literojn kun afableco. Jozefo diris: Se vi kuraĝas, frato, kunprenu lin do kun vi. Li kunprenis lin, sufiĉe timplene kaj antaŭzorgeme, sed la knabeto kunvojaĝis plej plezure. 2 Kuraĝe li eniris la lernejon, kaj trovis tie libron kuŝanta sur pupitro. Li ekprenis ĝin kaj eĉ ne legante la literojn en ĝi, li malfermis la buŝon kaj parolis en Sankta Spirito. Kaj li instruis la ĉeestantojn, kiuj aŭdis lin, pri la Torao. Granda amaso kuniĝis por ĉirkaŭstarante aŭskulti lin, kaj ili miris pri la beleco de lia instruo kaj la trafeco de liaj argumentoj, ĉar tion li diris, estante ankoraŭ tre juna. 3 Kiam tion aŭdis Jozefo, li tre ektimis, kaj kuris al la lernejo, konsiderante, ĉu ne ankaŭ tiu edukisto <fariĝos kripla>. Sed la edukisto diris al Jozefo. Vi sciu, frato, ke mi ja akceptis ĉi knabeton kiel lernanton, sed li jam estas plena je graco kaj saĝo; por la estonto, mi petas vin, frato, kunprenu lin al via hejmo. 4 Kiam tion aŭdis la knabeto, li tuj alridetis lin, kaj diris: Ĉar prave kaj ĝuste vi atestis, dank' al vi resaniĝos tiu, kiu estis punita. Kaj tuj saniĝis la alia edukisto. Sed Jozefo kunprenis la knabeton kun si hejmen.



**16** 1 Alian fojon Jozefo sendis sian filon Jakobo por kunligi lignaĵojn kaj porti hejmen; akompanis lin ankaŭ la knabeto <Jesuo>. Dum Jakobo kolektis branĉetaron, vipuro mordis la brakon de Jakobo. 2 Kiam elstreĉiĝinte surtere li estis mortanta, Jesuo alpaŝis kaj plumblovis la vundon; tuj malaperis la doloro, kaj la besto krevis. Jakobo estis komplete sanigita.

**17** 1 Poste en la najbaraĵo de Jozefo mortis knabeto malsana, kaj ege ploris lia patrino. Aŭdis Jesuo, kiel granda estas tiu ĉagreno kaj tiu bruo, kaj tien li kuris. Li trovis la knabeton mortinta, ektuŝis lian bruston kaj diris: Al vi mi diras, etulo: ne mortu, sed saniĝu. Kaj restu ĉe via patrino. Kaj tuj li ekrigardis kaj ridis. Al la sinjorino li diris: Prenu lin, kaj donu lakton al li, kaj memoru pri mi. 2 La ĉirkaŭa amaso vidis tion, miris kaj reagis: Vere – ĉi knabeto estas Dio aŭ anĝelo de Dio, ĉar ĉiu lia parolo fariĝas realaĵo. Jesuo foriris de tie, kaj ekludis kun aliaj infanoj.

**18** 1 Iom poste, dum konstruiĝis iu domo, fariĝis grandega bruo. Jesuo stariĝis kaj iris tien. Vidante viron kuŝi mortinta, li ekprenis ties manon kaj diris: Al vi mi diras, sinjoro: Ekstaru, kaj plenumu vian laboron. Tuj li stariĝis, kaj adorkliniĝis antaŭ li. 2 La amaso tion vidis kun granda miro kaj diris: Tiu ĉi infano estas ĉiela; ĉar multajn animojn li savis el la morto, kaj li savos multajn aliajn dum la tuta vivo.

**19** 1 Kiam li estis dekdujara, liaj gepatroj vojaĝis laŭkutime al Jerusalemo por la Paska festo kune kun sia karavano. Kaj post Pasko ili reiris hejmen. Sed ĝuste kiam ili foriris reen, la knabo Jesuo ree iris al Jerusalemo; liaj gepatroj supozis lin esti en la karavano. 2 Post vojaĝado de tuttaga distanco, ili lin serĉis inter la parencoj, kaj kiam tie ili ne trovis lin, ili tristiĝis kaj reiris al la urbo por tie serĉi lin. Post la tria tago ili trovis lin en la templo, kie li sidis meze de la instruistoj kaj aŭskultis ilin kaj starigadis demandojn. Ĉiuj atentis pri li kaj iris, kiel tiel juna knabo povas mutigi la pliaĝulojn kaj la instruistojn de la popolo, klarigante al ili la ĉefajn punktojn de la Torao kaj la parabolojn de la profetoj. 3 Lia patrino Maria aliris al li kaj diris: Kial tion vi faris, infano? Jen ĉagrene ni

serĉadis vin. Jesuo diris al ili: Kial vi serĉis min? Ĉu vi ne scias, ke mi devas esti ĉe la aferoj de mia Patro? 4 La skribistoj kaj la fariseoj diris: Ĉu vi estas la patrino de ĉi knabo? Ŝi respondis: Jes. Ili diris al ŝi: Benata vi estas inter la virinoj, ĉar Dio benis la frukton de via ventro; ĉar tian honoron kaj tian virton kaj saĝon neniam ni ĉu vidis ĉu aŭdis. 5 Jesuo stariĝis kaj sekvis la patrino, kaj li restis obea al siaj gepatroj. Lia patrino memortenis ĉion okazintan. Jesuo kreskis en saĝo, aĝo kaj graco. Al li la honoron por eterne. Amen.

---